# FRANCA KATOLIKA ESPERANTISTO

LA HOUSSAYE EN BRIE
77610 FONTENAY TRESIGNY
FRANCE

★ **Organo de FRANCA KATOLIKA ESPERANTO-ASOCIO, filio de I. K. U. E.** ★

**(Association Catholique Française pour l'Espéranto)**

Prezidanto: S-ro R. Cl. COLAS 6, rue de Mézières 75006 PARIS
Sekr: F-ino G. PREUX 55/3 Rés. Terrasse Rue du 11 nov. 59290 WASQUEHAL
Kasistino: S-ino J. VINCENT L' Oazo B. P. 54. 49150 BAUGE
Religia konsilanto: P-ro L. BOURDON 7, avenue Salomon 59000 LILLE
Peranto I.K.U.E: P-ro R. DEGRELLE B. P. 23 54510 TOMBLAINE

C.C.P. Association Catholique Française pour l' Esperanto 2324 93 N ROUEN

==== la n°: 6 F. Abono: 23 F (TTC). Kotizo: 7 F. Sume: 30 F. ====


++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++

N.B. La materialon por la bulteno oni sendu al S-ino Vincent <u>nepre</u> antaŭ la 5-a de februaro, majo, aŭgusto kaj novembro.

++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++


==== N° 150 ==== BULLETIN TRIMESTRIEL ==== TRIMONATA BULTENO ====


*** Sankta PIO X-a, preĝu por ni. ***


==== SEPTEMBRO 1986 ====


++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++

## BILETO DE LA PREZIDANTO

En cette année 1986, sur le plan mondial, la pensée des peuples est tournée particulièrement vers la réalisation du désir de paix qui habite tout être humain, même si tous ne s' en font pas une image identique, même si les chemins proposés sont différents.

En ces jours de juillet, l' un des hauts-lieux de France, la colline de Vézelay, que couronne la basilique Ste Madeleine, a accueilli un rassemblement international. En ce lieu, l' un de nos plus anciens pèlerinages, d' où autrefois l' on partait pour Compostelle, où Saint Bernard prêcha la seconde croisade, en 1146, fut lancée huit cents ans après, la croisade de la réconciliation: après la fin de la 2ème guerre mondiale, une rencontre des anciens belligérants, animés par la foi, décidés à reprendre ensemble le chemin de l' amitié. En 1986, quarante ans après, une foule d' anciens et de jeunes pouvaient renouveler les mêmes gestes de fraternité et d' amour, redire ensemble leur engagement de travailler en commun à la construction de la paix du monde.

Monseigneur Ernoult, archevêque de Sens, accueillant cette foule par le salut de Jésus ressuscité:"Que la Paix soit avec vous" concluait par cet appel: "tes frères et tes soeurs t' attendent dans tes relations de la vie quotidienne, dans tes responsabilités... Dans cet engagement... manifeste que la paix est possible: elle est l' affaire de tous..."

Ce n' est pas en isolés que nous pouvons agir; ce ne sont pas seulement les efforts à l' intérieur de notre pays qui seront efficaces: notre vocation, c' est sortir de nos frontières, rencontrer fraternellement les hommes "d' ailleurs", comprendre et connaître ceux qui peuvent avec nous penser, perler, agir; une communauté de langage est le plus sûr moyen pour développer une communauté de pensée, pour permettre des échanges en profondeur, pour participer ensemble, sur le plan universel, à la création d' une grande vague capable d' emporter les haines, les suspicions, les terreurs qui entretiennent les inimitiés.

../...

Que les peuples cessent de se regarder comme des agresseurs potentiels, qu' ils cessent d' attendre des forces de destruction les plus perfectionnées la sécurité de leurs cités et de leur culture.

Le 27 octobre, à Assise, le pape Jean-Paul II, entouré des représentants de différentes religions, s' associera à eux dans une journée consacrée à la prière pour la paix. A la base aussi, il faut que les chrétiens fassent ensemble la même démarche. A nous particulièrement, qui avons une vocation universelle aux relations directes à travers les frontières, d' utiliser notre langue commune pour développer de peuple à peuple, de famille à famille, des rapports amicaux, fondés sur la volonté ferme de construire ensemble un monde fraternel.

"Seigneur, ouvre nos esprits et nos coeurs aux exigences de l' amour fraternel, pour que vienne ton règne de justice et d' amour". (Pax Christi)

R. Cl. COLAS

RESUMO

1146. En la baziliko Sankta Magdalena en Vézelay, Sankta Bernardo alvokis la popolojn el okcidento al la 2-a krucmilitiro, kies mistika celo estis la liberigo de la sanktaj lokoj.

1946. En la sama preĝejo, multego da homoj, militintoj de ĉiuj flankoj intermiksitaj, kuniĝis en komuna fervoreca kredo, por ekliĝiĝi en novan krucarmeon, tiu de la reamikigo kaj de la paco.

1986, jaro proklamita "jaro de la Paco", nova kunvenego en kiu miksiĝis malnovaj kaj junaj generacioj, venis en la saman lokon por preĝi kaj renovigi la promeson faritan 40 jarojn antaŭe: labori senĉese por la paco de la mondo.

Kiel diris la ĉefepiskopo Monsinjoro Ernoult en sia akcepta prelego, la mondo atendas de ni, en ĉiuj rilatoj kaj agoj de la ĉiutaga vivo, la sintenadon kaj la apostoladon de la Paco.

Nia alligiteco al la Internacia Lingvo vokas nin al preterpaso de la ideaj kaj materiaj limoj, al frata renkonto de la aliaj; la uzado de komuna lingvo ebligas plej profundajn interŝanĝojn, samagadon kontraŭ la malamoj, kontraŭ la instrumentoj de la malamo kaj de la timigo.

En Asizo, la 27-an de oktobro, papo Johano-Paŭlo II-a, kun diversreligiaj aŭtoritatuloj, kunvenos por dediĉi preĝon kaj interparolojn al la kaŭzo de la paco en la mondo. Unuigitaj kun ĉiuj kredantoj, filoj de la sama Patro, ni havas ankaŭ la devon konstrui la surteran Pacon.

R. Cl. COLAS

oooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooo

PRENU TEMPON

Prenu tempon por pensi,
Tio estas povofonto.
Prenu tempon por ludi
Tio estas sekreto por senfina juneco.
Prenu tempon por legi
Tio estas saĝofonto.
Prenu tempon por ami kaj esti amata
Tio estas Dia favoro.
Prenu tempon por esti amika
Tio estas feliĉovojo.
Prenu tempon por ridi
Tio estas animmuziko.
Prenu tempon por donaci
La tago estas tro mallonga
Por ke oni estu egoista.

(Afrika anonimulo)

oooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooo

NIA MEMBRARO

Koran bonvenon ni deziras al nia nova membro:

3) S-ro FONTANIER (Nièvre)

IKUE-membroj: 40) DESPINEY Roger; 41) FAIRBANK James; 42) DEGOUL François.

PRI KELKAJ SANKTULOJ ( daŭrigo)

SANKTA PAULO MIKI, sacerdoto, kaj kunuloj, martiroj

Komence de la 16-a jarcento, Japanujo iĝis konata pere de eŭropaj komercistoj. Misiistoj migris al tiu insularo, unue Francisko Ksaviero, poste Franciskanoj, Dominikanoj, Jezuitoj kaj Aŭgustenanoj. La imperiestro estis bonvola al la katolikoj. Ĉirkaŭ la urboj Meako, Osaka kaj Nagasaki ekestis katolikaj komunaĵoj Tio malplaĉis al la japanaj pastroj, kiuj serĉi kialon por ekstermi la religion. Komercistoj asertis, ke la misiistoj preparas la vojon al hispan-portugalaj konkeroj. La persekuto tiam furiozis tra la tuta lando, ĉar la imperiestro nilatis al ĝi. Paŭlo Miki kaj 25 kunuloj estis krucumitaj en 1597 en Nagasaki. Ili estas la unuaj martiroj en Malproksima Oriento. Papo Urbano VIII-a beatigis ilin en 1627 kaj Papo Pio IX-a kanonizis ilin en 1882. La grupo konsistis el pastroj kaj laikuloj, eŭropaj misiistoj kaj kristanoj japanaj. 215 pliaj martiroj de Japanujo estis beatigitaj de Papo Pio IX-a en 1867. Dum longaj jaroj, la lando estis fermita kontraŭ influo de katolikismo.

SANKTA BLAZIO, episkopo kaj martiro

Pri lia vivo, oni malmulton scias. Antaŭ ol iĝi episkopo, li praktikis medicinon. Li estis episkopo de Sebasto en Armenio kaj torturita sub la regado de la romia imperiestro Licinio en 316. Oni honoras lin kiel grandan miraklofaranton, kaj alvokas lin ĉefe kontraŭ gorĝmalsanoj, pro la mirakla resaniĝo de knabo englutinta fiŝoston. En lia festotago, 3-a de februaro, oni donas la Blazio-benon, kiel protektilon kontraŭ gorĝmalsanoj.

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

PRI NORVEGUJO ( daŭrigo)

Hodiaŭ la komunikaj malfacilaĵoj inter la diversaj partoj de la lando estas venkitaj. Oni povas nun vojaĝi de nordo al sudo en multe malpli da horoj ol da tagoj antaŭ apenaŭ 50 jaroj.

Longe antaŭ la konstruo de vojoj, la homoj interkomunikis per ŝipoj. En la vikinga periodo, la linio laŭ la okcidenta marbordo estis nomita vojo al nordo aŭ norvegr: el tio venas la nomo Norvegujo. La loka laŭborda ŝiptrafiko ankoraŭ estas grava elemento en la ekonomia vivo. La ekspreslinio Hurtigruten, kun ŝipoj veturantaj dum la tuta jaro, transportas pasaĝerojn, poŝtaĵojn kaj varojn inter la haltejoj sur la dektagojn longa linio, kiu iras de Bergen ĝis Kirkenes.

La konstruado de moderna vojreto alportas komplikajn problemojn pro la topografio de Norvegujo. Tamen per kombino de vojoj kaj pramoj eblis krei racian komunikreton por la aŭtoj.

La fervojoj ne havis pli facilajn problemojn. Hodiaŭ la vagonaroj trapasas ĉirkaŭ 775 tunelojn kaj 3000 pontojn. Malpli ol kvarono de la tuta traklongo kuŝas sur ebena tereno. Hodiaŭ la ĉefaj linioj radias de Oslo al ĉiuj direktoj: la plej longa iras ĝis Bodø norde de la arkta cirklo. Proksimume 80 % de la norvegaj fervojoj uzas elektrajn trajnojn. Populara vojaĝo per fervojo kondukas de Oslo al Bergen. Oni tie vidas tipan norvegan pejzaĝon kun industriaj urboj, fekundaj valoj, altaj montoj kaj fjordoj.

La norvega loĝmedio estas varia. En la marbordaj urboj, ekz. Bergen, necesis, ke la domoj grimpu laŭ la montflankoj for de la limigita ebena areo apud la maro. Sur la kamparo, la bieno situas inter altaj arbarkovritaj deklivoj kun lageto malsupre.

Kie ajn loĝas la Norvegoj, ili ĝuas socialajn kaj kulturajn avantaĝojn. Per ampleksa popolasekuro, ĉiuj rajtas ricevi pension, plenan asekuron kontraŭ malsano, senlaboreco, kripliĝo, kaj aliajn socialajn servojn.

En la arkta insularo Svalbardo (Spicbergo) vivas ĉirkaŭ 1000 Norvegoj, kiuj ekspluatas karbominejojn. La insularo havas relative mildan klimaton pro la influo de la Golfa Fluo. Oni trovas tie sovaĝajn bestojn: boaco, blanka urso kaj arkta vulpo.

Laŭ la broŝuro eldonita en Esperanto de Reĝa Norvega Ministerio pri Eksteraj Aferoj)

( daŭrigota)

* * *

## KELKAJ UTILAJ INFORMOJ

EL LITOVIO: "Kaŭnasa Esperanto-Klubo festis la 20-jariĝon de sia ekzistado ĉe urba kulturpalaco, kvankam fakte Kaŭnas estas lulilo de litovaj esperantistoj: tie multajn jarojn loĝis unua litova esperantisto prelato A. Jakŝtas-Dambraŭskas kiu jam en 1890 eldonis unuan E-lernolibron por litovoj. Li estas entombigita ĉe muro de katolika baziliko. Krome en Kaŭnas ekzistas Zamenhofstrato, ĉe kiu staras la domo de Zilberniek-edzino de la aŭtoro."

el letero de V. Baniulaitis, Klaipeda.

EL ROUEN: la loka asocio organizas 4 semajnfinojn lingvajn kaj kulturajn. 1-a aranĝo: 29/30-an de novembro 1986 en Rouen. Kotizo: 100 F aŭ 15,5 Ekuoj; 70 F aŭ 11 Ekuoj por junuloj ĝis 26-jaraj. Malmultkostaj gastejoj kaj restoracioj apud la kursejo. Inf: Groupe E° région rouennaise 43, rue Desseaux 76100 ROUEN. Tel: 35 72 71 17.

++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++

## INVITATION

Notre congrès BAGNEUX (Hauts-de-Seine)
Notre assemblée générale - Nantes 1986 a choisi Paris pour accueillir notre prochain congrès. Toutes les lignes principales SNCF, toutes les grandes artères routières convergeant vers la capitale, nous espérons une nombreuse participation.

En raison de la difficulté de trouver un lieu au coeur de la ville, c' est dans la toute proche banlieue que nous nous réunirons: Bagneux est situé à 20 mn de la porte d' Orléans et bien desservi par les autobus.

La Maison diocésaine, qui accueille chaque année de nombreux groupes: retraitants, jeunes, animateurs, catéchistes, met ses ressources à notre disposition.

Cette rencontre nous permet de vivre quelques jours en communauté de chrétiens, pratiquant l' Esperanto, réfléchissant à l' action spécifique de notre mouvement et aux buts propres de notre association.

Nous invitons spécialement nos frères chrétiens à se joindre à nous dans un esprit oecuménique, et les espérantistes intéressés ainsi que les débutants à venir nous rejoindre. Notre but est de conserver au domaine spirituel sa place dans le monde fraternel de l' Esperanto et de nous y comporter, dans le respect de tous les autres, en disciples de Jésus-Christ.

## INVITO

Nia kongreso BAGNEUX 1-3/5/1987.
Nia ĝenerala kunveno elektis Parizon kiel lokon de nia venontjara kongreso. Ĉiuj ĉefaj fervojlinioj, ĉiuj ĉefaj ŝoseoj sin direktas al la ĉefurbo, kaj ni atendas multajn partoprenantojn.

Ĉar malfacilas trovi taŭgan lokon en la urbo mem, ni kunvenos en tute proksima antaŭurbo: Bagneux kuŝas je 20 mn de la Orléans-pordo kaj facile atingebla per busoj.

La "Maison diocésaine", kiu ĉiujare akceptas multajn grupojn: izoliĝantoj, gejunuloj, animantoj, katekistoj, disponigas al ni siam bienon.

Tiu kunveno donas al ni la eblecon vivi kelkajn tagojn en kristana komunaĵo, praktiki Esperanton, mediti pri la specifa agado kaj propraj celoj de nia asocio.

Ni invitas speciale niajn kristanajn fratojn kunveni kun ni en ekumena spirito, kaj ĉiujn interesulojn kaj komencantojn. Nia celo estas rezervi al la spirita kampo ĝian lokon en la frata Esperanto-mondo, kaj nin montri, en respekto al ĉiuj, kiel disĉiploj de Jesuo-Kristo.

++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++

## FRAGMENTOJ DE NEKONATA PSALMO (1685-1985)

1-a fragmento

Ĉie malpiuloj reĝas,
Ĉie la maljusto leĝas,
Kaj vanege mi vin preĝas:
Vi silentas super mi.
Vi repuŝis la popolon,
Kiu faris vian volon;
Vi nin ĵetis en la solon.
Nin forgesis nia Di'!

La paganoj triumfantaj
Nun pri ni mokadas, vantaj;
Bruas nun blasfemoj kantaj
Spitaj vin en via templ';
Kaj ni dume nur disŝiras
Niajn vestojn, ni sopiras,
Kaj silente ni primiras
La misfaron sen ekzempl'.

Fajroj ambraj kaj incensaj
Fumas nun en nuboj densaj
Por idoloj, por senpensaj;
Tio vin ne tuŝas, ve!
Vi eltenas sen kolero,
Ke forĉesis la ofero;
Plu neniu sur la tero
Baldaŭ kredos al Jave'.

Tradukis B. Aunis

FKEA-KONGRESO EN BAGNEUX 1/3-an de MAJO 1987

*

Alveno: 30/4 vespere - Forveturo: 3/5 posttagmeze.

PERANTO: S-ro COLAS 6, rue de Mézières 75006 PARIS

KONGRESEJO: Maison diocésaine "Les Marronniers" 6, rue Pablo Neruda
92220 BAGNEUX

KOTIZOJ: individuo: 55 F; geedza paro: 80 F; infano ĝis 16-jara, blindulo, sacerdoto, religiul(in)o, alilandano, KELI-ano: senpage.

PAGOJ: Association Catholique Française pour l' Esperanto.

LIMDATO: 10-an de aprilo 1987.

PREZOJ: tranoktado kaj matenmanĝo 40 F (2-litaj ĉambroj)
tagmanĝo 45 F vespermanĝo 35 F

*

PROGRAMO: aperos en la decembra bulteno.

---

ALIĜILO ( limdato 10-an de aprilo 1987)

sendota al S-ro R. Cl. COLAS 6, rue de Mézières 75006 PARIS

S-ro, S-ino, F-ino (1)

Adreso:

Naskiĝdato (nur por infanoj):

aliĝas al la kongreso laŭ la ĉi supraj kondiĉoj kaj pagas:

| | | |
|---|---|---|
| aliĝo | 55 aŭ 80 | ...... |
| vespermanĝo 30-an de aprilo | 35 | ...... |
| tranoktado 30/4-1/5 | 40 | ...... |
| tagmanĝo 1-an de majo | 45 | ...... |
| vespermanĝo " | 35 | ...... |
| tranoktado 1/2 | 40 | ...... |
| tagmanĝo 2-an de majo | 45 | ...... |
| vespermanĝo " | 35 | ...... |
| tranoktado 2/3 | 40 | ...... |
| tagmanĝo 3-an de majo | 45 | ...... |
| | Sume | |

(1) Forstreku la senutilaĵojn.

Mi deziras ... fervoja(j)n rabatilo(j)n.

DATO SUBSKRIBO

ENHAVO

1. 2. Bileto de la prezidanto
2. Prenu tempon
3. Pri kelkaj sanktuloj
Pri Norvegujo
4. Utilaj informoj
Invito al la kongreso
Nekonata psalmo
5. FKEA-kongreso en Bagneux 1987
6. Kotiztabelo

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

KOTIZTABELO 1986

| | |
|---|---|
| IKUE kun "Espero Katolika" | 80 F |

Peranto: P. Degrelle c.c.p. NANCY 2 555 38 L.

----------

| | |
|---|---|
| ACFE kun "Franca Katolika Esperantisto" (individuo) | 30 F |
| Geedza paro | 40 F |
| Infano ĝis 16-jara, pastro, religiul(in)o | 15 F |
| Bonfaranto | 150 F |
| Dumviva membro | 600 F |

----------

| | |
|---|---|
| UFE kun "Revue Française" | 185 F |
| UEA kun "Esperanto" kaj Jarlibro | 190 F |

Association Catholique Française pour l' Esperanto c.c.p. ROUEN 2 324 93 N.

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

Dépôt légal: 3ème trimestre 1986 !! Polycopié par l' A. C. F. E.
C.P.P.A.P. nº 62 532. !! Prieuré St-Martin
Directeur: René-Claude Colas !! La Houssaye-en-Brie
Directeur-délégué: !! 77610 FONTENAY TRESIGNY
René-Jean Marmou !! FRANCE

* * * * * * *

* * * * *

* * *

*